

KOMENCANTO

revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Maksimova Tatjana [Berŝetj, Rusio]

Vintraj plezuroj

2003

Kiel Mikaelo Bronŝtejn, konata poeto, tradukisto kaj bardo iĝis esperantisto — la tria periodo de E-literaturo — verkoj de niaj legantoj tempo kaj homoj — neelpensita historio — gramatiko serioze kaj amuze aforismoj — anekdotoj — diversaj ondoj el bunta mondo invitoj kaj informoj — korespondu!

6

Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia (DF) - BR - 70084-970

Britio Eric Walker, Downham Reach Cottage, Nacton, Ipswich, IP10 0LA

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

Ĉinio Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037, Beijing

~ S-ro Cui Jiayou, P.O.Kesto 448, Lixin 158120, Jixi, Heilongjiang

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykøbing F.

Estonio Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

Finnlando Heta Kesala, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Francio Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Hispanio Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio Višnja Branković,

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

Irlando Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

Japanio Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to, Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, Havana

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo

Nov-Zelando David Dewar, 4 Harlech Mews, Christchurch 8004

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Portugallio Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto, N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

Svedio SEF, Lisbet Andreasson, Sodra Rorum, Husarlyckevagen 29, SE — 24294 Horby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schledorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Redakcie

Karaj legantoj!

Tiu ĉi kajero aperas sojle de la jaraŝango kaj novjaraj festoj. Ĉi tiu jaro montris, ke ni povas konsideri nian revuon kiel vinantan organismon: ĉar ĝia enhavo konsistis ofte el viaj verkoj, kiuj estis la viva respegulo de viaj vivaj impresoj. Dum la jara periodo ni havis multajn ĝojojn: malfermis por si interesajn aŭtorajn individuojn kaj renkontis originalajn verkojn; sed malĝojo ankaŭ ne ĉirkaŭiris nin: ni perdis nian fidelan amikon kaj kontribuanton Bill Thorne. Sed feliĉe arkivo de "K" ankoraŭ havas multajn donacojn, kiuj restis por ni de li. Unu el tiuj donacoj — humuran rakonton en bildoj — vi trovos sur gajaj paĝoj. Krom tio en la numero vi legos verkojn, dediĉitajn al vintro kaj Novjaro, kristnaskan fabelon en la rubriko "Tempo kaj homoj" kaj eĉ "Neelpensita historio" temas pri la vintra miraklo de Naturo. Vi ĝuos multajn bildojn de niaj aŭtoroj, kiuj ankaŭ bele prezentas vintron kaj la feston.

Tre interesas rakonto pri esperantistiĝo de konata poeto, tradukisto kaj bardo Mikaelo Bronŝtejn, kiu ankaŭ donacis al "Komencanto" siajn belajn poemojn.

En la rubriko "Diversaj ondoj de bunta mondo" vi atendas renkonto kun interesaj materialoj de niaj kontribuantoj el Japanio.

Karaj amikoj! Ni esperas, ke ni restos kune en la venonta 2004 jaro kaj kune faros multon utilan kaj interesan.

KOMENCANTO

2003 numero 6 // (44) // 6 numeroj jare
regule aperas ekde 1998

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafsova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: komencanto@r66.ru

retpaĝo: <http://Esperanto.net/Komencanto>

abontarifo por 2004:

internacia tarifo: 15 eŭroj

orientaŭropa kaj latinamerika tarifo: \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

rusia tarifo: 150 rusiaj rubloj poŝtmandate al:

Кудрявцев Виктор Васильевич, 620041,


Екатеринбург, аб. ящ. 132.

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K".
La sola kondiĉo - nepre menci i KOMENCANTO'n,
la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loglokojn.

Kiel tio komenciĝis

Mikaelo Bronŝtejn

Poeto, tradukisto, aŭtoro de kelkaj libroj, animo de rusia E-movado, kun kies bardaj kantoj kreskis kelkaj generacioj de sovetiaj-rusiaj esperantistoj



Mia nomo ne gravas...

Tiun ĉi titolon havas unu el miaj kantoj kaj ankaŭ la lasta disko da tiuj. Ĝi aperis antaŭ unu monato en la disko-serio "Oraj Kantoj".

Efektive, ne gravas la nomo, gravas la homo. Sed mi ne faru sekreton. Mi estas Mikaelo Bronŝtejn, 54 jarojn aĝa provincano el la Leningrada regiono. Mia biografio ekster Esperanto-lando estas tre simpla kaj ordinara. Mi naskiĝis en la okcidenta Ukrainio, ekde 16-jara aĝo laboris, poste studentiĝis en Tula Politeknika Instituto, en Rusio, ĉar tiam limoj inter la du ŝtatoj ne ekzistis. Mi havis nur tri laborlokojn dum mia vivo post la diplomigo kiel inĝeniero pri elektro. Dum dek jaroj mi laboris en la filio de la fama uzino "Kirovskij", poste dum la vica deko – en la norda urbo Vorkuta, en karbominejo kaj la trian jardekon – en la uzino, kiu produktas plastajn aĵojn. Nun mi estas juna pensiulo. Jen estas la tuta vivo.

Kaj ĝi vere estus tia, se mi ne havus la bonŝancon renkonti dum mia infana aĝo bonan homon – mian Instruiston. Li estis neordinara persono. Dum la Dua Mondmilito Andreo Rogov (tiu estas lia nomo), posedanta brile la germanan lingvon, herois kiel militesploristo. Li iris antaŭ la fronto, ĉasante oficirojn de la malamika armeo kaj ricevante de ili utilajn informojn. Pro tio li estis honorigita per multaj ordenoj kaj medaloj. Post la milito li estis bona pedagogo, longtempe – direktoro de mezlernejo. Sed ĉefe – li estis esperantisto, kaj transdonis al ni, geknaboj, ne nur la lingvon, sed sian estimon al la nobla ideo de interpopola amikeco pere de la lingvo Esperanto.

Do, kiam mi havis 12 jarojn, dank' al Andreo Rogov, mia Instruisto, mi verkis mian unuan poemeton en Esperanto. Post unu jaro, en la grupo, gvidata de li, mi partoprenis mian unuan Esperanto – tendaron, kaj tie mi komprenis, ke mi ne plu povos vivi sen tiu varma, bonkora popolo diversnacia, sed parolanta unu lingvon – Esperanto. Kiom da esperantistaj renkontiĝoj mi partoprenis ekde tiam – malfacilas kalkuli. Sed, miaopinie, la plej interesa parto de mia vivo pasis en la Esperantujo.

Mi ne faru ankaŭ alian sekreton. Antaŭ ol mi ekverkis en Esperanto, mi faradis multajn, mi diru, versprovojn en la rusa. Mi verkas en la rusa ĝis

Mia nomo ne gravas

nun, se estas konvena humoro. Sed Esperanto estas mia preferata lingvomedio.

Pasintjare mi pace festis la 40-jaran datrevenon de mia unua verkoprovo en Esperanto. Se iu ŝatas precizan raporton pri tio, kion mi faris dum tiuj kvar jardekoj, bonvolu ricevi.

Unuavice – estas verkitaj aŭ tradukitaj pli ol kvincent kantoj – dudeko el tiu kvanto havas la ŝancon supervivi la aŭtoron. Tio ĝojigas. Aparta afero estas poemoj originalaj, kiuj ne fariĝis kantoj pro mia tute amatora muzika edukado. Sed multajn el tiuj poemoj prenis la brila melodiisto Ĵomart kaj la profesia komponistino Elena Puhova. El miaj modestaj poemoj ili faris kantojn vere ĉarmajn. La lastatempa kunlaboro okazis en fino de la pasinta jaro, kiam laŭ peto de Elena mi estis farinta la kantotekstojn por ŝia muzikalo "La Eta Princo".

Ekde 1992, - tio signifas, ekde la apero de eldonebleco por la Esperanto-libroj en Rusio, - estas produktitaj 14 miaj aŭ parte miaj libroj. Inter ili originalaj – la romaneto "Oni ne pafas en Jamburg", la poemaroj "Jen, denove..." kaj "Du lingvoj", la kantaro, kaj la historia libreto "Legendoj pri SEJM". Krom tiuj aperis tradukita volumo de Puŝkin-poemoj, la sama de la Nobelpremiito Iosif Brodskij, tri romanoj de la fratoj Strugackij k.t.p. Krom libroj venis en la mondon tri miaj kodiskoj. Homoj diras ke ili estas plaĉaj, ankaŭ tio ĝojigas. La kodisko "Akceptu mondo nin amike", kiu enhavas la kantojn de Elena Puhova kaj mi, ankaŭ rikoltas sufiĉan estimon.

Kiu iam komencis verki, tiu ne povas halti – estas aksiomo. Do, mi vivas plu kaj daŭrigas mian laboron en Esperanto por Esperanto – lingvanoj.

Ĝuan legadon, karaj komencantoj!

Mikaelo Bronŝtejn

Pasis senzorga viv

Pasis senzorga viv'
 pasis ebria omam'...
 Mia angoro - vi.
 Mia turmento - am'.
 Flustras ĉirkaŭa hor'
 pri evidenta ĉagren':
 -Via estont' - dolor'!
 - Via helpont' - venen'!
 Fuĝas mi en silent'
 for de bigota mok'.
 Mia amiko - vent'.
 Mia animo - nokt'.
 Sed en matena flam'
 ĉerpas mi forton nun.
 Mia feliĉo - am'.
 Mia esper' - fortun'.
 Kredu - degelos envi'
 en la printempa motiv',
 ĉar mia amo - vi!
 Ĉar nia ĝojo - viv'!

1970

* * *

Mi konscias, ke nun
 post la viv' duonplena
 staras mia fortun'
 inter "se" kaj "apenaŭ".
 Mi konscias, ke hor',
 forpasinta malŝpare
 en ĉagren' aŭ amor',
 evitendas avare.

Serĉas klavojn la man',
 forte frapas ondar' de
 la animocean',
 kaj elplaŭdas plenarde
 al ekrana blanket'
 rimoj, kiujn prirevas
 mi, sed scias mi, ke
 ĉion ĉi mi ricevas

el la plag', el plezur'
 el la vivo plej simpla
 el la svaga forkur'
 de l' horeto pasinta.
 Do, mi ploras kaj amas
 kun ĉagren', kun kares',
 kaj fortune ekrampas
 de "apenaŭ" al "jes".

aprilo 2003

Mikaelo Bronŝtejn**Poemoj****Al...**

Ni ne memoras pri l'
 doloraj lecionoj
 de nia fora am',
 pasinta kun ĉagren' -
 printempa sonoril'
 per forgesitaj sonoj
 averte vokas nin
 ĉe nova amoven'.

Doloras mia dors',
 kvazaŭ flugiloj kreskas.
 Doloras mia cerbo
 en krea antaŭvid'.
 En oĝo kaj dolor'
 mi renaskiĝon festas -
 la sunon de l' printemp'
 post longa morna vintr'.

Doloro ĝis delir',
 feliĉo ĝis ebrio!
 Jen la subita plor',
 jen la subita rid'.
 Doloras ĝua spir',
 kvazaŭ potenca Dio
 produktas vin por mi
 el mia propra rip'.

Kaj amo kaj malam'
 egale malkomfortas.
 Trankvile, sen inspir'
 en stalo maĉas mul'.
 Elektas amon mi,
 ĉar nur per amo fortas
 en premo de rutin'
 fragila krea brul'.

Do, mi konfesu, ke
 feliĉas mia Dio,
 ke en prudenta griz'
 de mia longa viv'
 retrovas amon mi
 kaj amas malgraŭ ĉio
 kun ĝuo, kun dolor',
 kun kredo kaj naiv'.

inter 1996 k. 1999

Venis printempo...

Venis printempo peka,
 pela, provoka, veka,
 pluva, degela, seka,
 sana aŭ apoteka.

Venis printempo pika,
 loza, lanuga, lika,
 arda, amorefika,
 hela kaj eĉ helika.

Venis printempo drola,
 fajna, fragila, fola,
 brila, beata, bola,
 pranca, priamparola.

Venis printemp' ebria,
 kvika, kvivita, kria,
 festa kaj fantazia,
 kaj ja refoje - mia !

apr. 2001

* * *

Nokto, trajn' hazarda
 kaj matena nuno.
 Hela tag' bizara:
 Moskvo, frosto, suno.
 Paŝo en junecon,
 kvazaŭ flug' al kosmo,
 kiel en komenco :
 suno, frosto, Moskvo.

Arda spir' iama,
 telefona budo -
 restis kvazaŭ sama
 tiu juna ludo.
 Restis antaŭsento :
 -Tu-u ! -atendo muta,
 kaj jam post momento
 la feliĉ' balbuta.

Sed en telefono
 iu gapas kaŝe,
 kaj sensenta sono:
 - *Kak zdorovje vaŝe?...* *
 Kaj malam' etendas
 manojn maltenere.
 Kion mi atendas?
 Frosto, vere...

Mi denove vagas
 en la mondo sama,
 larmajn ŝuldojn pagas
 al pasinto ama,
 kaj la cerbon kvazaŭ
 pikas fiŝa osto
 ĉe memorokazo :
 suno, frosto, Moskvo.

jan. 1981

(* Kiel vi fartas?)

La tria periodo de esperanta literaturo

Karaj legantoj!

Daŭrigante prilumon de la tria literatur-historia periodo ni prezentas ankoraŭ unu francan verkiston Jean Ribillard. Malgraŭ tio, ke lia verkaro ne estas tre ampleksa, liaj originalaj verkoj malkovras al ni tre interesan aŭtoran individuon, aparte menciindan.

Jean Ribillard naskiĝis en 1904 en Francio. Profesie li estis majoro kaj estis devigita multajn jarojn pasigi eksterlande. Liaj eksterlandaj travivaĵoj kaj impresoj iĝis poste inspira bazo por liaj originalaj kreaĵoj en Esperanto. J. Ribillard multe deĵoris ekster Eŭropo, plejparte en Afriko, kaj ek-siĝis el la armeo tuj post la dua mondmilito.

J. Ribillard fariĝis esperantisto en 1948, jam estinte matura. Li estis redaktoro de la Eŭropa eldono de "La Budha Lumo", aktive kontribuis al multaj Esperanto-periodaĵoj: "Esperanto", "Heroldo de Esperanto", "Nica Literatura Revuo" kaj per franclingvaj artikoloj - al diversaj gazetoj.

Sed la plej vaste konataj estas du libroj, verkitaĵoj de J. Ribillard: liaj skizoj sub titolo "Vagado sub palmoj", aperinta en 1956, kaj ankaŭ skizkolekto "Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud", eldonita en 1963. En la unua li kun majstra stilo, humuro kaj ĉarmo priskribas vojaĝon en la dezerto. En "Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud" araba azeno filozofas pri la vivo kaj ties strangaĵoj. Ne malpli interesa ol la filizofiado estas la vivaj figuroj, skizitaj kun profunda psikologia penetremo, kaj la priskribo de la moroj kaj medio de la araba mondo. Poezie bela stilarto, mikso de revo, realo, sonĝo kaj fantazio faras prozon de J. Ribillard impresa realaĵo de nia literaturo.

Bedaŭrinde li vivis mallongan vivon (mortis en 1962 en Tahitio), dum kiu ne multon sukcesis krei, sed tiuj verkoj, kiujn li lasis post si, restas inter niaj literature altvaloraj. Kiel ĉiam, karaj legantoj, ni proponas al vi legi fragmenton el la verko de la aŭtoro.

Sadretdinova Naila [Voronej, Rusio]



Jean Ribillard

Preĝo de M'Saud

Dio bona, kiel fervore tiu bastono draŝas mian skeletan spinon! De la opala tagiĝo ĝi superŝutas min per obstina timpanado. Ĉu ĝi prenis mian pelvon por nerompebla gongo? Mi ja agnoskas, ke mi estas nur malnova azenaĉo, kiu urĝe bezonas riparon, sed kiu tamen meritis pli da estimo pro longedaŭra servuto. Ĉi matene mi aŭdis viron flustranta pri mizerulo: "Li spertas hundan vivon". Se tiu kreteno scius, kio estas vivo de azeno! Sed venĝemi ne mieligos mian faton. Antaŭ longlonge, dek jaroj eble, mi naskiĝis en la palmaro de Colomb-Bechar...

... Mi estis rava hufuleto, la ĝojo de la ĝardeno, la trezoro de mia panjo. Mi rapide admirigis la tutan najbararon, kun fidebla piedo, perligiza nazo kaj la plej ĉarmaj oreloj, kiujn oni iam vidis. "Vera rozkapeto", asertis la kompetentuloj. Pro tio oni baptonomis min M'Saud (araba nomo, kiu signifas "feliĉa"). Mi floradis en gracio kaj belo, kiam mortis mia kara patrino, foruzita de malmoderaj traktoj. Tiam ĉesis miaj senzorgaj infanjaroj, kaj mi devis perlabori mian vivofojnjon...

... Mi ne rakontos al vi, kiom da profesioj mi poste plenumis: plugisto en Beni-Abbés, migranta komercisto en Saŭravalo, akvoportisto en Ksabi... Kiom da turmentoj mi ĉie eltenis: bastonadoj, malsato, skabio, sunfrapoj, tabanoj... la plej bonajn mi preferas prsilenti. Mi, kiu estis ĉiumatene striglita, brositita, polurita, kun jasmenfloro ĉe la brido kaj kombita vosto — vidu tiun necesejan balaileton, kiun mi nun publike montras — mi rapide velkiĝis pro hontinda nelekto.

Kio vi fariĝis, Rozkapeto?

Plie tre ĉagrenas min tiuj kalumniaj klaĉoj, kuj tralande kuras pri miaj mensaj kapabloj. Kiam malklera lemanto ne scias solvi matematikan problemon, la instruisto nomas lin azeno kaj kapvestas per paperĉapo kun du longaj konusoj. Kiam malĝentila homo ne plu povas argumenti al idioto, li azenumas lin... Al mi la knaboj ĵetas ŝtonojn... Mi blekas ne pro plezuro, sed iafoje, dum la plenlunaj noktoj por amvoki pin-up-inon gracitalian kaj velurhautan; ankaŭ plejofte por prikrii al la siroko la mizeron kaj malesperon, kiu forturas mian genton de kiam ŝipkapitano Noa ĝin forregalis el sia arkeo. "Ofte kantas la buŝo, kiam ploras la koro", skribis via profeto Zamenhof. Ĉar mi denaske estas pacema kaj sendefenda, tial ĉiu disverŝas sur min sian koleron, sian malsaĝon, sian malicon. Dio justa, kiu dormetas sur via reakcinubo, estingu, mi petas, tiun ofendan fifamon, kiu venenas miajn siestojn.

Promesite? Dankon.

Sur tiuj ĉi paĝoj estas prezentitaj la verkoj de niaj legantoj, dediĉitaj ĉi-foje al hela neĝa vintro kaj Novjara festo.

Karaj amikoj! La redakcio deziras al vi sukcesplenan, eventoriĉan novan 2004-an jaron, ĝojon, bonhumoron kaj Kreemon!

Všivceva Tatjana. [Miass, Rusio]

Vintras blanke mondo vasta

Vintras blanke mondo vasta,
Tia milda kaj senhasta.

Falas neĝo. Jen neĝeroj
Fluge dancas super tero!

Strate pinojn kaj abiojn
Homoj portas energie

Baldaŭ tintos pokaletoj
kun ĉampan-vezikoj etaj...

Ĉion bonan al vi, kara(j)
En venonta Nova Jaro!



Morev Aleksandr [Puŝkin, Rusio]


Neĝo arĝentas

Neĝo arĝentas. — Blua vespero...
Ombroj de arboj kuŝas sur pad'.
Kaj la ĉielo stelan riveron
Verŝas sur brilan lun-rad'.
Estas kvieto nature, anime
Vento malforta por mi - kvazaŭ frat'.
Flugas subita folio pilgrime
Kiel en maro fantoma fregat'.

Santi Elena Bullo [Mestre, Italio]

Norda vento

Dum la norda vento
blovas kaj senpaŭze frapas
al fenestroj aŭ pordoj
mi suferas pro via foresto.
En la intimeco de la hejmo
brilas la lampoj de la studoĉambro.
Nur far vi, al mi restas
leteroj, folioj, fotoj, libroj...





Timur Halilov | Ekaterinburg, Rusio

Ju. Golubenkova

Esperantigis **Belousov Igorj**. [Engels, Rusio]

En la arbaro naskiĝis abieto

Evidente, la vento-vaganto alportis semon de abio sur la mezon de arbarkampo. Ĝi elĝermis kaj post kelkaj jaroj transformiĝis je bona lanuga abieto. La abieto kreskis en la mezo de la arbarkampo, kaj ĉiuj admiris ĝin. Proksimiĝis Novjaro, kaj ĉiuj decidis, ke la abieton necesas ornami.

La nokta ĉielo verŝis sur ĝin helajn stelojn kaj la abieto ekbrilis per helaj fajretoj sur siaj branĉetoj. La ora luno sendis al ĝi sian misteran lumon, kaj la abieto eklumis enigme kaj gaje.

Neĝulino demetis sian tukon kaj iom da brilantoj kaj ornamis per ili la abieton. Kaj Avo Frosto donacis al ĝi kristalajn glacipendaĵojn. La leĝeraj neĝeroj plektiĝis inter si en bizarajn ĉenojn kaj ornamis ĝiajn branĉetojn, kaj ruĝbrustaj piroloj, traflugante super la abieto, malsuprenjetis sur ĝin siajn multkolorajn plumojn.

Bela abieto fieris per sia festvesto, kaj pli aĝaj malgajemaj abioj rigardis ĝin karescme kaj iom mokeme.

— Ah, kia belulino! - ekkriis la leporino, saltinte al la arbarkampo, - rigardu, fileto, kia miraklo estas!

— Miraklo, miraklo! - gaje kriis la leporido.

La saĝa sciuro ekaŭdis nekonatan bruon kaj elrigardis el sia nesto. Ĝiaj nigraj okuletoj ekbrilis pro admiro kaj ĝi ankaŭ diris: "Miraklo!"

La ruza vulpo singarde aperis el post la abio kaj envie ekspiris.

Nur granda maljuna urso, kiu jam multe da jaroj loĝis en tiu ĉi arbaro, per siaj pezaj paŝoj venis sur la arbarkampon kaj mire diris:

— Kial mi ĝis nun ne vidis tiun belecon, kaj de kie ĝi aperis, ne estas kompreneble.

— Hej, bestoj, - ekkriis li, - iru ĉi tien, necesas ja renkonti la Novjaron.

Kaj ĉiuj bestoj kunvenis sur la arbarkampo, faris la rondon kaj ekturigiĝis en komuna amika danco.

Instruaj versoj pri prefiksoj kaj sufiksoj

(daŭngo, komenco en "K"-5-2003)

15

-ej estas sufikso uzata por lok';
por ludi - lude**jo**, koke**jo** - por kok'.

16

Trinke**bla** - la akvo; trinke**inda** - ĉampan';
trinke**ema** - la viro kaj eta infan'.

17

Por **igi** kaj **iĝi** klarigi al vi,
Mi donos ekzemplon nun lernu per ĝi:

18

Knabino pur**igis** la plankon kun pen',
la tablo pur**igis** per pluv' en ĝarden'.

19

Sukero - dolĉ**aĵo**, per ĝia dolĉec'
dolĉigas la kafon patrina bonec'.

20

-ul: vira persono, **-ulino** virin';
la edzo - kar**ulo**, kaj ŝi - kar**ulin**'.

21

La plej etan parton signifas la **-er**
ekzemple: fajr**ero**, pluv**ero**, gre**ner**'.

22

Konsiston el multaj signifas la **-ar**;
el ŝtupoj - ŝtup**aro**, el arboj - ar**bar**'.

23

Ĉe karaj gepatroj ni diras al li
karese nur "Pa**ĉjo**", kaj "Pa**njo**" al ŝi.

24

La al-apartenon signifas la **-an**
al grupo - grup**ano**, al urbo - urb**an**'.

25

-ad montras ripeton kaj daŭron de fraz';
ekzemple, muĝ**adas** dum vento la mar'.

26

Du**ono** de dudek dek estas, ne pli,
kaj unu tri**ono** de naŭ estas tri.

27

Du**oble** tri estas tutcerte nur ses
sep estas tre grava eraro. Ĉu jes?

28

Marŝadas soldatoj de l' infanteri'
kutime kvar**ope**, ok**ope** aŭ pli.

Esperanta Alfabeto

Legu:

a — bo — co' — ĉo
do — e — fo'
go — ĝo — ho' — ĥo
i — jo — ĵo'
ko — lo — mo' — no
o — po — ro'
so — ŝo — to' — u
ŭo — vo — zo'.


Post la hejma task' korekta
sur bretaro de Anjet'
kuŝis en la ord' perfekta
Esperanta alfabet':

Sed subite sur la breton
saltis lude la katet'
kaj per sia piedet'
puŝis Anjan alfabeton.

Falis la literoj plankon.
O ruliĝis sub la ŝrankon,
tien **C** ruliĝis ankaŭ.
A difektis sian flankon.

Malaperis tuj sen spuro
la arketo super **Ŭ**,
restis **K** sen sia kruro
kaj simila nun al **V**.


E forrompis suban platon
kaj ek ĝi fariĝis **F**,
Z deŝiris supran laton
kaj aspektas liel **L**.



Ĉapeletojn perdis **Ĉ**,
Ĝ, kaj **Ĥ**, kaj **Ĵ**, kaj **Ŝ**.
Nun, nereconeblaj tute
kuŝas ĉiuj kriplaj mute.

Koroleviĉ Aleksandr [Ukrainio]

Kiam ĉambron venis Anjo,
ŝi ne punis la kateton,
sed kun help' de l' bona panjo
ŝi riparis l' alfabeton.



Kornjuhina Anna [Barnaul, Rusio]

Venis milda, stela nokto...
Dormas post labor' Anjet',
dormas ankaŭ en la ordo
Esperanta alfabet'.

LINGVAJ RESPONDOJ

L. L. Zamenhof

Pri la uzado de "li" anstataŭ "ĝi"

Vi skribis, ke parolante pri infano, vi uzas "li" anstataŭ "ĝi", ĉar vi ne aprobas "la anglan kutimon starigi infanojn sur unu ŝtupon kun bestoj kaj objektoj".

Kontraŭ la uzado de "li" en tiaj okazoj oni nenion povus havi: sed la *kaŭzo*, kial ni (kaj ankaŭ la lingvo angla) uzas en tiaj okazoj "ĝi", estas ne tia, kiel vi pensas. Nek la lingvo angla, nek Esperanto havis ian intencon malaltigi la indon de infanoj (ambaŭ lingvoj estas ja tiel ĝentilaj, ke ili diras "vi" ne sole al infanoj, sed eĉ al bestoj kaj objektoj). La kaŭzo estas tute natura sekvo de la konstruo de la ambaŭ diritaj lingvoj.

En ĉiu lingvo ĉiu vorto havas (tute ne logike) difinitan sekson, kaj tial, uzante por ĝi pronomon, ni prenas tiun, kiu respondas al la gramatika sekso de la vorto (tial la franco diras pri infano "il", la germano diras "es"); sed en la lingvo angla kaj Esperanto la vortoj havas nur sekson *naturan*, kaj tial, parolante pri infanoj, bestoj kaj objektoj, kies naturan sekson ni ne scias, ni *vole-ne-vole* (sen ia ofenda intenco) uzas pronomon mezan inter "li" kaj "ŝi" — la vorton "ĝi". Tiel same ni parolas ankaŭ pri "persono".

Cetere, parolante pri infano, pri kiu ni *scias*, ke *ĝi* ne estas knabino (aŭ almenaŭ *ne scias*, ke *ĝi* estas *knabino*), ni povas uzi la vorton "li".

Esperantisto,
1893, p. 16

Pri la pronomo por bestoj

Kiam oni parolas pri bestoj, mi konsilas ĉiam uzi *nur* la senseksan pronomon "ĝi", — ne sole kiam (en la plimulto de okazoj) la sekso de la proparolata besto estas por ni indiferenta, sed eĉ en tiaj okazoj, kiam ni parolas precize pri la sekso de la besto.

En la tre maloftaj okazoj, kiam la precizeco povas nepre *postuli*, ke ni montru la sekson de la besto per la uzata *pronomo*, la teorio ne malpermesas al ni uzi la vorton "li" aŭ "ŝi"; sed en ĉiuj ordinaraj okazoj mi konsilus uzi la pronomojn "li" kaj "ŝi" nur por homoj.

Respondo 35,
La Revuo,
1908, Majo



L.L. Zamenhof en 1887

Pri "li", "ŝi", "ĝi"

La pronomoj "li" kaj "ŝi" estas uzataj nur por personoj; por aferoj, objektoj kaj ankaŭ por bestoj ni uzas la pronomon "ĝi", ĉar en tiaj okazoj la sekso ne ekzistas.

Se ni tamen, parolante pri objektoj aŭ bestoj, volas esprimi difinitan sekson (viran aŭ virinan), tiam ni povas uzi "li" kaj "ŝi".

Esperantisto, 1892, p. 79


Pri "ĝi" anstataŭ "tio"

La vorton "ĝi" ni uzas, kiam ni parolas nek pri viro, nek pri virino, sed pri io, kio ne havas sekson aŭ kies sekso estas por ni nekonata aŭ indiferenta; sekve ni preskaŭ ĉiam povas tute bone uzi tiun ĉi vorton ankaŭ anstataŭ "tio", kies senco estas preskaŭ tia sama.

Tial anstataŭ "tio" (= la "io" kiun mi vidas antaŭ mi) estas vi, Ivan Karpoviĉ", mi povas tute bone diri "ĝi estas vi, Ivan Karpoviĉ".

Respondo 17, *La Revuo*, 1907, Junio

Horloĝo rapidis kaj malrapidis: ĝi la mastrojn helpis

Hispana fabelo

Mi rakontos al vi pri unu simpatia olda sinjoro kaj same simpatia knabo. La oldan sinjoron oni nomis Don Huan kaj li estis generalo. La knabo estis nur lerneĵano kaj havis nomon Huanito.

Evidente en ilia familio okazis iu malfeliĉo, ĉar el ĝi restis nur Huanito kaj Don Huan. Ekde la trijara aĝo la knabo loĝis kun sia avo kaj ili sukcesis forte ekami unu la alian. Don Huan estis jam maljuna, kion oni povis konjekti laŭ lia longa griza barbo. Sed tio ne malhelpis al la nepo, kiam li estis tute eta, grimpi ĉiumatene al la lito de la avo — ili ja dormis en la sama ĉambro — kaj plekti la arĝentajn harojn de la estiminda barbo.

Memkompreneble ke la knabo kreskis, kaj la avo maljuniĝis, sed malgraŭ tio, en ilia ĉambro ĉiam senĉese batis tri koroj: de la avo, de la knabo kaj de la vekhorloĝo. Tiu vekhorloĝo estis en domo de la avo jam dum multaj jaroj, kaj oni ĝin amis same, kiel oni amas fidelajn servantojn, kiuj iĝas jam preskaŭ anoj de familio, ĉar travivis kune multajn sukcesojn kaj malfeliĉojn. La avo kaj la nepo forte kutimiĝis al la vekhorloĝo kaj eĉ elpensis por ĝi nomon: ili nomis ĝin Don Tik-Tak.

Vintre, kiam frumatene post la fenestroj estas plena mallumo, la vekhorloĝo turmentis sin per teruraj duboj — de unu flanko, ĝi komprenis, ke devas veki la lerneĵanon, por li ne preterlasu la lecionojn, sed de la alia... Don Tik-Tak ege volis ŝajni, ke ĝi "forĝesis" sonori. Foj-foje ĝi tiel faris, kiam sentis, ke la marmora tabulo, sur kiu ĝi staris, estas tre malvarma, kaj konjektis, ke la stratoj estas kovritaj per blanka neĝo kaj glita glacio.

La bonulo zorgis ankaŭ pri la avo. La vekhorloĝo sciis, ke por maljunuloj estas utile ekdormiĝi

pli frue, tial al la vespero ĝi komencis iom rapidi kaj rapidis ĝis tiu momento, dume la generalo ne kredus, ke estas jam malfrue, kaj kuŝus en la lito.

Foje somere la generalo forĝesis fermi por nokto fenestron en la ĉambro. Iu vagabondo rimarkis tion kaj penetris en la domon el la strato, senbrue malfermis la ŝrankon kaj jam komencis ligi en nodon paradan uniformon de la generalo, mantelon de Huanito kaj arĝentan cindruj-

on, kiam la vekhorloĝo lin rimarkis kaj eksonoris kiel eble plej laŭte. La ŝtelisto ektimis, saltis tra la fenestro kaj forkuris. Kun si li nenion prenis.

Foje la avo ekmalĝojis. Li timis: ja povas okazi, ke pro la neĵuna aĝo li vere povas forlasi tiun ĉi mondon, kaj la knabo, sen liaj zorgoj, fariĝos huligano, kiaj dum la tutaj tagoj vagas sencele tra la stratoj.

La saĝa Don Tik-Tak, kiu tiom da jaroj loĝis ĉe la avo, ĉion komprenis. Li sciis, ke post ĉiu ĝia "tik-tak" la generalo iĝas pli maljuna ĝuste je unu tiu "tik-tak" kaj li klopodis "tik-taki" malplirapide, por en la kara por ĝi domo la tempo pasu malrapide-malrapide, kaj la avo maljuniĝu ankaŭ malrapide-malrapide kaj povu ankoraŭ longe zorgi pri la nepo kaj liveri al tiu utilajn konsilojn. La generalo rimarkis, ke la tagoj pasas ne tiom rapide, kiel li timis, kaj lia humoro tuj pliboniĝis, kaj li denove ekĝojis.

Sed foje nokte, kiam ĉiuj, krom Don Tik-Tak, dormis, la vekhorloĝo, iom cerbuminte, diris al si mem:

"Nu, bone, dume mi laboras malrapide, la avo ne maljuniĝas, tio veras, sed ankaŭ la knabo ne maturiĝas; lia infaneco povas prokrastiĝi. Evidente mi devas tik-taki pli rapide, por la knabo maturiĝu antaŭ ol la vivo de generalo venos al la fino".

Ĝi tiel faris, sed, memkompreneble, ekde la momento, kiam la tempo en la domo ekfluis pli rapide, ol en la ceteraj domoj, tuj evidentiĝis, ke la avo maljuniĝas pli kaj pli rapide. Nia lerneĵano vere, dank'al Tik-Tak, kreskis de tago al tago, sed la generalo denove ek-sopiris kaj baldaŭ tute senesperigiĝis.

Kaj jen, dum unu el la noktoj, kiam la vekhorloĝo pensis: "Kion fari?" - al ĝi venis brila ideo. Matene ĝi ne sonoris. Ĝi ne sonoris kaj morgaŭ, kaj postmorgaŭ.

— Nu, kion fari, — diris Don Huan al Huanito, — necesas aĉeti novan vekhorloĝon, — nur promesu al mi, ke la malnovan vi ne forĵetos.

— Ĉu mi povas forĵeti la malnovan vekhorloĝon?! Mi ja amas ĝin same kiel vin! Kaj malgraŭ tio, ke la sonorilo ne sonoras, sed ĝi ja bone funkcias kiel horloĝo kaj montras ĝustan tempon.

Finiĝis per tio, ke en la domo aperis nova vekhorloĝo, kiu ricevis nomon Tiki-Taki. Ĝi estis plena de junaj fortoj, brilis kvazaŭ nova arĝento kaj al la Don Tik-Tak rigardis desupre, traktante ĝin kiel "ruiniĝitan kaleŝon". Sed kiam ili restis vid-al-vide, la malnova vekhorloĝo kun la solena mieno ekparolis:

— Mi ŝajniĝis, ke mi rompiĝis, por igi la mastrojn aĉeti vin. Vi estas tute nova. Sed mi jam estas ruinaĵo, tamen mi scias, kiel ni kune povas fari unu bonan aferon. En tiu ĉi domo loĝas duopo: la maljunulo, kiu timas morti antaŭ ol lia nepo maturiĝos, kaj la knabo — li estas bona knabeto, sed en tiu ĉi vivo li dume estas same malsperta, kiel vi. Se ni decidus helpi ilin, necesas fari tiel: mi montrus tempon al la avo kaj ne rapidos, por ke la olda Don Huan maljuniĝu kiom eble malrapide. Kaj vi montru la tempon al Huanito, kaj penu esti lerta kaj indiki la tempon pli rapide ol ceteraj horloĝoj, por la knabo kresku pli rapide kaj kapablu esti memstara... Kaj tiam lia avo fin-fine ĉesos tristi.

— Via propono tre plaĉas al mi, — respondis Tiki-Taki, — kaj mi faros ĉion, kion vi diris.

Jen kial, kiam Huanito jam sukcesis ricevi postenon de kapitano, la olda generalo daŭre bonfartis en tiu ĉi mondo.

En tiun tagon, kiam la avo, tute maljuniĝis kaj ekdormis per eterna dormo, Don Tik-Tak eksonoris per ĉiuj siaj fortoj, kvazaŭ volis veki sian majstron. Pro tiu superforta streĉo risorto en la horloĝo disŝiriĝis kaj ĝia "tik-tak" eksilentis. Ankaŭ por eterne.

Sed Huanito ĝis nun konservas tiun ĉi vekhorloĝon en sia ĉambro kaj al ĝia ciferplato li algluis foton de Don Huan, kiun tiel amis li mem kaj la malnova vekhorloĝo...

Nu, kion fari, forflugis abelo — finiĝis fabelo.

esperantigis **Rafija Jafasova**
[Ekaterinburg, Rusio]

Neelpensitaj historioj

Norda brilo

Sendormeco ne estas tipa por mi. Mi ja estas ne 60- sed nur 21-jara. Sed dum tiu nokto de 29 al 30-a de oktobro mi ne povis ekdormi. Horloĝo montris kvaronon antaŭ la kvara. Obstine kuŝante en la lito, mi malespere penis endormiĝi, anstataŭ lula kanto mi ŝaltis radion kaj "vagis" tra ĝiaj ondoj, esperante ekaudi ion proksiman al mia koro.

Vicfoje kaptinte iun lokan ondon meze de megaherca skalo, mi streĉis aŭdon al tio, kion diris en etero nia loka radiostacio. Ĝi atentigis pri iuj strioj sur la ĉielo. Kompreninte, ke io okazas ekstere, mi saltis al la fenestro kaj vere ekvidis sur la ĉielo blankajn striojn, similajn al nuboj. Streĉinte rigardon mi rimarkis ke ili moviĝas. Pensoj pri lasera spektajo rapide foriĝis kaj mi ekkuris en ĉambron al dolĉe dormantaj hejmanoj por voki ilin observi la nordan brilon. Samtempe mi ekmemoris averton pri eventuala magneta ŝtormo.

Kaj jen starante sur la balkono ni beatas pro tio ke iĝis spektantoj de la magio. Ĉi tio estis jam la dua norda brilo, kiun mi feliĉis vidi. La unua estis iam en 1986. Sed tiama brilo distingiĝis de la nuna. Ĝi okupis malpli da ĉielo kaj estis iom pli hela. Norda brilo, kiu ludis sur la ĉielo nokte la 30-an de oktobro, aspektis ondeca kaj malhasta. Ĝi okupis duonon da ĉielo inter tero kaj steloj, kaj mi vidis ilin kvazaŭ grandegajn stalaktitojn, pretajn por deŝiriĝi kaj enpikiĝi en la teron. Norda brilo ludis per siaj duondiafanaj kolonoj. Jen ili grandiĝis, jen malgrandiĝis kaj fine malaperadis.

Vento fortiĝis kaj komencis peli nin for de la balkono en varmecon de la ĉambro, nordaj "stalaktioj" komencis brili per tenere lila kaj verda koloroj. La urbeto komforte lumiĝis per siaj apudvojaj stratlampoj. Mi rigardis fenestrojn en domoj, malantaŭ kiuj loĝis homoj kaj eĉ ne suspektis ke io okazas super iliaj tegmentoj. Bedaurinde...

Sed ĉion tion ankaŭ mi ne vidis, se oni min ne atentigus per radio. Dankon al ĝi.



Impresojn de **Aljono Mevo**, [Jakutsko., Rusio]
Esperantigis **Boogier**. [Niĵnij Novgorod, Rusio]

Bona konsilo ĉiam estas utila.

AFO RISM OJ

Konsilo
de S. P. Korolov

10 konsiloj de T. Jefferson* por la praktika vivo

trovis kaj esperantigis
Belousov Igorj [Engels. Rusio]

Se vi faras rapide, sed malbone, ĉiuj baldaŭ forgesos, ke vi faris rapide, sed longe memoros, ke vi faris malbone. Kaj kontraŭe, se vi malfruis, sed faris bone, ĉiuj baldaŭ forgesos, ke vi faris malrapide, sed longe memoros pri tio, ke vi faris bone.

Sergej P. Korolov
konstruanto de kosmaj ŝipoj



1. Prokrastu neniam ĝis morgaŭ, kion vi povas fari hodiaŭ.
2. Ne trudu al alia persono laboron, kiun vi mem povas plenumi.
3. Ne elspezu monon pli frue, ol vi ĝin posedas.
4. Aĉetu neniam tion, kion vi ne bezonas.
5. Evitu la fieron, ĝi malutilos vin pli multe ol la malsato, soifo kaj malvarmo.
6. Neniam bedaŭru, ke vi tro malmulte manĝis.
7. Kion vi faras, faru volonte.
8. Ne maltrankviliĝu pri malbonoj, kiuj okazos neniam.
9. Rigardu la aferojn ĉiam de ilia bona flanko.
10. Kiam vi koleras, kalkulu ĝis dek, antaŭ kiam vi parolos; se vi estas tre kolera, kalkulu ĝis cent.

tradukis **D-ro Kabe**

* Thomas Jefferson (1743-1826), la tria prezidento de Usono.

Neniam faru tion, pri kio vin ne petas iu...

Humura rakonto en bildoj de
Bill Thorne





Foje Zamenhof...

Elpensitaj historioj el la vivo de Ludoviko Lazaro Zamenhof.
Kolektis kaj perlaboris N. Saldin [Ekaterinburg, Rusio]

Grigorij Arosev
[Moskvo, Rusio]

Kiel vi povas klarigi vian sorton per blato

Fino.
Komenco en la 4-a kajero

Nun lasu la blaton kuri

Se ĝi kuros antaŭen - vi ankoraŭ havas multon antaŭe.

Se ĝi kuros maldekstren - vi havos romantikan renkontiĝon.

Se ĝi kuros dekstren - atentu al la laboro - oni intrigas kontraŭ vi.

Se ĝi kuros reen al vi - ho, vi estas interesa homo!

Se ĝi tute ne ekkuros - ĝi mortis.

Foje al Zamenhof sinturnis iu komencanto:
— Estimata doktoro, mi en songoj vidas min fama esperantisto. Kion fari, por songo efektiviĝu?
— Necesas malplimulte dormi.

*

Foje Zamenhof demandas ĉe De Beaufront:
— Kial malsukcesis via Ido-lingvo? Vi ja tre kompetentas en lingvaj demandoj.
— Jes, sed mi ne kompetentas en *Lingvaj Respondoj!*

*

Foje Zamenhof legas la projekton de Ido kaj diras:
— Bone, bone, tre bone...
— Ĉu vere ĉio estas bone? - demandas lin de Beaufront.
— Bone, ke tion verkis ne mi.

*

Foje Zamenhof renkontas Lorjakon kaj demandas:
— Kiel vi sintentas en novaj okulvitroj, kiujn mi al vi preskribis?
— Belege, - ridetas tiu, - Mi nun renkontas homojn, kiujn mi ne vidis dum kelkaj jaroj!

*

Foje Zamenhof vizitis restoracion kaj esploris menuon.

— Kial en via menuo ne estas indikitaj prezoj? - demandis li kelneron.
— Ni ne volas malbonigi apetiton de niaj klientoj, - respondis tiu.

*

Foje Zamenhof renkontas Waringhienon.
— Kion vi faris dimanĉe?
— Mi veturis kaptadi karasojn.
— Ĉu vi multajn karasojn kaptis?
— Eĉ ne unu.
— Tiam de kie vi scias, ke kaptis ĝuste *karasojn?*

*

Foje Klara Zamenhof diras al Ludoviko:
— Dume vi promenis, via papago forflugis.
— Mi tion atendis, - respondis la Majstro, - hieraŭ la birdo tro atente rigardis la mapon de Afriko.

*

Foje Zamenhof kaj Grabovskij kolektis en arbaro fungojn.
— Kara mia, - demandas Zamenhof, - vi ne scias, ĉu ĉiuj tiuj fungoj estas manĝeblaj?
— Jes, kara Majstro, - Sed iuj el ili nur unufoje.



Karaj amikoj! Hodiaŭ sur niaj "ondoj" estas Japanio, lando mistera kaj fabela, moderna kaj antikva. Lando de sankta Fuji-monto kaj floranta sakuro, lando de originaĵa orienta filozofio kaj interesaj tradicioj.

Japanaj proverboj

Sibayama Zyun'iti [Kamakura, Japanio]

Aŭdi nur unu, kompreni jam dekon.
temas pri granda saĝeco

Al pordo de la ridantoj venos feliĉo.
ĉiam estu bonhumora

Verŝi akvon sur la vizaĝon de rano.
tute ne dolorige, sed male ĝojige


Predikanto de Konfuceaj diraĵoj ne mem konas Konfuceajn diraĵojn.
pri hipokritulo: (Predikanto de Biblio ne konas ...)

Rizkukon lasu fari al rizkukisto.
pri ajna afero okupiĝu profesiulo

proverboj kiuj postulas iom da kono pri budhismo

Ne pli ol tri fojojn eĉ ĉe la budha vizaĝo.
Budho estas konsiderata kiel larĝanimulo akceptanta ĉion. Sed eĉ Budho koleros, se oni faros aĉan aferon pli ol tri fojojn.

Paradizo laŭ aŭdo, infero laŭ vido.
pri tio, ke onidiro aŭ reklamado ofte trompas



Nakamura Daishin [Japanio]

Efika medikamento estas amara.

Io varmega trapasas gorĝon, kaj oni tuj forgesas ĝian varmegon.

Budao permesas kulpon ĝis la tria fojo.
eĉ milda homo finfine povas koleriĝi

Uzi okulkuracilon de la supra etaĝo.
temas pri io malfacila, havanta tro malgrandan ŝancon

Rizo "japonica"

Jen estas du opinioj pri la preparo de tipe japana manĝaĵo, senditaj de niaj kontribuantoj el Japanio

Sibayama Zyun'iti, [Kamakura, Japanio]

Sibayama Zyun'iti avertis nin: en Japanio rizo bolkuirita estas tre populara. Sed ofte rizo, uzata en Eŭropo estas de la speco 'hindia' (indica), ĉe kiu mol-elasteco de la japane kutima rizo ne estas akirebla.

Oni devus uzi rizon de la tipo 'japania' (japonica). Sed mi dubas, ke tiun japanecan rizon oni povus akiri ie aliloke, krom Japanio.

Kutime preskaŭ ĉiuj japanoj kuiras tiun rizon en elektraj rizkuirujoj.

Osioka Moritaka [Hirosima, Japanio]

S-ano Osioka Moritaka skribis siavice:

Por japanoj rizo havas du specojn, nome nia "Japonica" kaj alilandaj. La unua longas pli-malpli 5mm., dum alilandaj longas 7mm. Jen, mia recepto:

Unue: trovu rizon 5mm-an "Japonica".

Due: lavu ĝin ĝis akvo puriĝos.

Trie: kuiru ĝin kun akvo per poto ĝis rizo fariĝos manĝebla.

Kvare: pretan rizaĵon iomete saligu kaj buligu per ambaŭ manoj, por formi la rizbulon.

Se eblas, rizbulo en sia kerno havu peklitan umeon (speco de japana abrikoto).

Esperanto-Redakcio de Pola Radio

Esperanto-Redakcio elsendas regule la programon en la Internacia Lingvo ekde la 4-a de aprilo de la 1959-a jaro. La esperantlingvaj prelegoj en Pola Radio komencis aŭdiĝadi sporade jam en la 1928-a jaro.

Nia celo estas ĉiutage vaste informi pri Pollando, prezenti ĝian evoluon kaj atingojn, peri informojn pri politikaj, sociaj kaj kulturaj eventoj en Pollando. Krome en niaj programoj apartan lokon ni dediĉas al la vivo de la esperantistaj medioj en Pollando kaj la mondo, al la problemoj de la demokrata lingvokomunikado en la epoko de tutmondiĝo kaj vastiĝanta Eŭropa Unio. Hodiaŭ la redakcion estras Barbara Pietrzak.

*Radio Polonia, Esperanto-Redakcio
00-970 Varsovio, Pollando.*

esperanto.redakcio@radio.com.pl

Pollando en Eŭropo

Magazino pritraktanta la transformiĝojn en Pollando lige kun la Eŭropa Unio.

LUNDE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj
MARDE: 9.30, 11.00 GMT

Trarigardo de la Esperanta gazetararo

Prezantas pri kio skribas polaj kaj eksterlandaj gazetoj aperantaj en la lingvo Esperanto.

MARDE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj
MERKREDE 9.30, 11.00 GMT

Pollando hodiaŭ

Soci-familia magazino.

MERKREDE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj
JAŬDE: 9.30, 11.00 GMT

Kultura magazino

Prezantas la kulturajn vivojn en la lando.

JAŬDE: 16.00, 19.00,
20.00 kaj VENDREDE:
9.30, 11.00 GMT

Al Eŭropo

Informbulteno pri la integroprocezo de Pollando kun la Eŭropa Unio.

SABATE: 16.00, 19.00,
20.00 kaj DIMANĈE: 9.30,
11.00 GMT



Homoj kaj problemoj

Varitemaj interparoloj pri interesvekaj problemoj, ligitaj ekz. kun la internacia komunikado, lingvaj rajtoj, originala Esperanto literaturo de poloj kaj eksterlandanoj, sciencaj esploroj pri Esperanto kaj aliaj.

VENDREDE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj
SABATE: 9.30, 11.00 GMT

Esperanto ekspreso

Bunte prezentas eventojn en la pola kaj internacia Esperanto movado, enhavas interparolojn kun aktivuloj, sonraportojn pri la polaj kaj internaciaj esperantistaj aranĝoj.

SABATE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj DIMANĈE:
9.30, 11.00 GMT

Kulturkroniko

Informkroniko pri la plej gravaj kultureventoj en Pollando.

DIMANĈE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj LUNDE:
9.30, 11.00 GMT

Leterkesto

Havas la formon de interparolo pri la temoj traktitaj en la korespondadoj de niaj aŭskultantoj; aŭdiĝas en ĝi respondoj je konkretaj demandoj en la ciklo "Spure de la leteroj", interparoloj kun geaŭskultantoj; estas priparolataj problemoj de la aŭdebleco. Leterkesto estas ankaŭ forumo por interŝanĝo de salutmesaĝoj inter aŭskultantoj de niaj elsendoj.

DIMANĈE: 16.00, 19.00, 20.00 kaj
LUNDE: 9.30, 11.00 GMT

Satelito

SAT – paralele al la mallongaj kaj mezlongaj ondoj iuj elsendoj estas emisiataj per satelito Eutelsat II F - 6 - Hot Bird, 13 gradoj de la orienta latitudo; frekenco 11,474 GHz, polarizado horizontala (H); subport. 7,38 MHz

09.30 - 09.59		SAT
11.00 - 11.29		SAT
16.00 - 16.25	m kHz	41.26 7270
19.00 - 19.25	m kHz	41.18 7285
20.00 - 20.29		SAT

De la 26 de oktobro 2003 ĝis la 27 de marto 2004. Laŭ GMT

Bill Thome



RIMARO

IKO

artifiko
baziliko
brasiko
briko
butiko
efiko
fabriko
formiko
grafiko
heliko
katoliko
kokeriko
kritiko
kroniko
laiko
logiko
lunatiko
maniko
matematiko
mekaniko
mistifiko
muziko
paniko
pediko
peniko
persiko
piko
pirotekniko
politiko
striko
taktiko
trafiko
tritiko
tropiko
tuniko
umbiliko
urtiko
veziko

IDO

avido
brido
decido
divido
fido
ido
insido
invalido
perfido
rapido
rido

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.

12-14 jaraj geesperantis-
toj dez.kor. kun samaĝu-
loj tutmonde. Skribu al:

Vitorova Tatjana
50 let Oktjabrja, 20 - 283
Volgograd
400000
Rusio

Mi estas 34 jara. Mi havas kna-
beton. Int filmoj, libroj, naturo kaj
muziko. Mi ludas futbalon kaj mi
grimpas rokojn.

Rob UTLEY
27 Sycamore Avenue
Leeds LS8 4DZ

Britio
rob.utlev25@hotmail.com

Mi estas 19 jara studentino.
Int: dancoj, muziko, kuirado,
vojaĝado, legado, bildkartoj.

Natalia Kazanceva
str. Perensona 5 "A"-154
Krasnojarsk,
660049

Rusio

Ĉiam konstante akceptas
korespondproponojn
**Japana Esperanto-
Korespond-Servo**

Sone-higasi 1-11-46-204
Toyonaka-si,
JP 561-0802
Japanio

Mi estas 19-jaraĝa,
mi kursas fakulta-
ton pri turismo. Int:
Komputilaĵoj,
geografio, kulturo,
rokmuziko, folkloro
muziko, ktp. Plaĉas
al mi fari amikecon
kun personoj el la
tuta mondo.

s-ro *Queiroz Felipe*
Rua Dr. Antonio
Bento, 106 Bairro
Vila Mathias 11075-
260 Santos-SP

Brazilo
fo.q@starmedia.com



Kornfiŝina Anna [Barnaul, Rusio]

**Koresponda
Servo
de
Edukado.net**

<http://www.edukado.net/korespondado.jep>

14-jara knabino dezi-
ras korespondi kun
gesamideanoj.

Mahbuba M. Atai,
Poŝtkesto 95715-188
Torbate Jam
Irano

Mi estas 19-jara esper-
antisto. Mi deziras kore-
spondi kun ĉeĥoj esper-
ante kaj ĉeĥe.

Aleksandr Derjugin
Kavkazskaja, 13-15
Saratov
410049

Rusio

KOMENCANTO
restas revuo por vi.
Ne forgesu
reaboni ĝin
por 2004!

Mi estas 15 jara kome-
ncanto.

Interesoj: matematiko,
muziko, historio, humuro.

Bergonso Maxime
597 Avenue de Trevoux
01000 Saint Denis les Bourg
Francio

bergonsom@yahoo.fr

500 diversaj Esperanto-
stampoj kaj poŝtmarkoj.
Ofertolisto kontraŭ 1 IRK aŭ
egalvaloro. Aĉeto de poŝt-
markoj de la tuta mondo laŭ
miaj aĉetlistoj:

Neussner,
DE-37284, Waldkappel
Germanio

Wuhan Esperanto-Asocio esperas ĝemelrilati
kun lokaj E-organizaĵoj tutmonde; 19 gekursa-
noj 18-60 jaraj tre deziras korespondi kun E-
geamikoj ĉieaj. Respondo certa!

p/a MO yhi xiong, Xiang-Xie-Li-She Xiao-Qu 1-
10601 Shi, Shen-Long-Street Te-1 Hao, W.E.D.Z.
CN-430056 Wuhan,

Ĉinio

Mi estas 20 jara studentino pri
administrado. Int: kulturoj, lerni,
amikeco, kor. kun samaĝuloj.

Priscilla van Blijswijk
van Bijnkershoeklaan 175
3527 XE Utrecht

Nederlando

P.N.vanblijswijk@students.usg.uu.nl

komencanto@r66.ru

<http://Esperanto.net/Komencanto>

viaj mesaĝoj, verkoj kaj leteroj estas ĉiam bonvenaj!

